

LA FONTOJ DE ESPERANTO

de

D. B. GREGOR, M.A., L.B.E.A.

ENHAVO

	paĝo
Antaŭparolo	92
Enkonduko	93
Fonetiko	94
Morfologio	95
Artikolo, Substantivoj, Akuzativo, Vortgenro, Pluralo, Ad- jektivoj, Adverboj, Prepozicioj, Konjunkcioj, Subjunkcioj, Personaj Pronomoj, Korelativaj Pronomoj kaj Adverboj, Verboj, Afiksaro, Vort-kunmeto.	
Vort-trezoro	99
Sintakso	103
Konkludo	104
Tabelo	107
Fremdaj vortoj cititaj	110
Indekso	110

**
*

ANTAŬPAROLO

Celo de ĉi tiu verketo estas, enmanigi al ĉiuj pri tio interesigantaj Esperantistoj la internajn, por ne diri intimajn, detalojn pri la naskiĝo kaj funkciado de ilia dua lingvo. Ĉu oni bezonas koni ilin? Por esti lerta, fervora, flue parolanta, bonstila verkanta Esperantisto, ne; por esti tia kaj plue kapabla argumente kontraŭstari iun ajn lingviston, ĝuste taksu la diversajn formojn de la Esperanta stilo, efektive sonigi la tutan klavaron de tiel grandioza orgeno, jes.

La scipovon kaj la kuraĝon necesajn por tia verko donis al mi Esperanto. Mi jam estris la francan, italan, kaj germanan lingvojn, kiam la jubilea Kongreso de 1937 en Varsovio vekis mian intereson pri la pola lingvo kaj mian deziron scii, kiel parolis la Majstro hejme. Poste, por povi kontentigi mian scivolon pri la Esperanta traduko de la Malnova Testamento, mi devis ne nur pliprofundigi mian konon de la hebrea lingvo, sed ankaŭ ek- kaj ellerni la rusan. Finfine do miaj oreloj estis agorditaj al la tuta gamo de la Esperanta muziko.

Tiam mi legis en la bela libro de Stojan, „Deveno kaj vivo de Esperanto”, ĉi tiun frazon (p. 32): „La scio de tiu (rusa) lingvo do necesas por seriozaj studentoj Ankoraŭ pli necesas tiu scio por gvidi la lingvo-evoluon al ĝusta direkto, indikita de Zamenhof.” Sur ne-slavajn Esperantistojn tio metas grandan ŝarĝon; kaj en la espero iom malpezigi ĝin, mi kuraĝis verki ĉi tiun studon. Ĝi estas senhonte kompilita laŭ la kriterioj de erudicio, t.e. laŭ la normoj kiuj gvidas verkadon de iu ajn libro destinita por profesiaj fakuloj. La digno de Esperanto meritas tion. La aparato de piednotoj celas garantii la aŭtentikon de miaj asertoj kaj altiri la atenton de la legantoj al tiuj dokumentoj, kiuj povus esti elirpunkto por iliaj propraj studoj.

Mi kredas, ke la ĉi tie donitaj informoj ne povas ne plifirmigi nian admiron por la genia kreitaĵo de Zamenhof kaj samtempe pliakrigi nian ĝuon de ĝia literaturo. *)

Northampton,

Anglujo.

la 20an de Junio 1956.

*) Mi deziras ĉi tie esprimi mian sinceran dankon al D-ro W. P. Roelofs kaj al S-ro Marin pro ilia atenta legado de mia manuskripto kaj pluraj valoraj sugestoj.

**
*

ENKONDUKO

Pri la cerba procezo kiu naskis Esperanton ni malmulton scias; tiom pli interesa do la anekdoto rakontita¹⁾ de F-ino Marie Hankel, unu el la pioniroj de la lingvo, pri la maniero en kiu Zamenhof atingis la decidon, doni al Esperanto la difinan artikolon. Vojaĝante kun li reen al Eŭropo el la U.K. en Vaŝingtono, la poetino ekkaptis la okazon, demandi al li pri diversaj aferoj tuŝantaj Esperanton. Zamenhof tiam diris al ŝi, ke la respondo al la demando, ĉu la lingvo havu aŭ ne difinan artikolon, donis al li sonĝo. Li sonĝis, ke li staras en kampo kun iuj viroj, kaj ili diskutas pri ia grava afero, - pri ia malfeliĉo, kiu okazos, se tri ruĝvestaj knabinoj eliros el arbaro videbla en la malproksimo. Subite unu el ili ekkrias: Jen la tri ruĝvestaj knabinoj! Zamenhof vekigis, sciante ke difina artikolo havas tre utilan, eĉ necesan, funkcion, nome limigi la signifon de vorto al la kunteksto; kaj li tuj decidis, ke Esperanto havu ĝin.

Ke Zamenhof sonĝis pri gramatika demando, ne estas sen signifo. Por sonĝi, la cerbo devas stari en aparta rilato al la sonĝotaĵo; kaj tiamaniere ni ricevas interesan duonrigardon en la psikan staton de

N.B. Por la notoj vidu paĝojn 105 kaj 106.

Zamenhof dum la naska laboro super Esperanto. Estis tute logike, ke li devis multe heziti pri tia demando; ĉar la du lingvoj, kiujn oni povas nomi ĉe li gepatraj - la rusa kaj la pola ²⁾ - ne havas artikolon, kaj pro tio demandi al si, ĉu enmeti ĝin en Esperanton, prezentis en tikla formo la tutan problemon de ties internacieco. Zamenhof devis nome decidi, ĉu en tiu ĉi okazo estas pli bone oferi la slavojn, donante al ili ian malfacilaĵon, aŭ perdi la avantaĝojn de la artikolo, kiujn ĝi dividus kun la latinidaj kaj teŭtonaj lingvo-grupoj. Nenia miro do, ke li songis ³⁾.

Jam en la fruaj tagoj oni riproĉis al Esperanto, ke ĝi estas tro „rusema” ⁴⁾. Unu el la Lingvaj Respondoj de Zamenhof kategorie refutas la akuzon, ke li uzas stilon slavan. Li klarigas, ke la slaveco estas nur ŝajna, devenanta el tio, ke „la slavaj lingvoj havas vortordon pli simplan kaj sekve pli proksiman al la vortordo en Esperanto” ⁵⁾. Sed Zamenhof amis la rusan lingvon, en kiu li estis edukata, kaj libere parolis ruse kaj pole ⁶⁾; do estus strange, se efektive lia slavlingva medio ne influus lian lingvosenton kaj ne stampus sin sur la lingvon. Plue, estis neeble, ke la fruaj verkistoj, preskaŭ ĉiuj rusoj aŭ poloj, ne enverŝu en la lingvon esprimojn kaj parolturnojn, kiuj multon ŝuldas al iliaj gepatraj lingvoj; kaj ĉi tion Zamenhof mem konfesas en la citita Respondo, kie li tamen insistas, ke tiaj esprimoj jam fariĝis Esperantaj idiotismoj. Sekve ne estas mirige, se iu ⁷⁾ jam skribis pri „la intima slava influo en la strukturo”, kaj trovas ke ĝia animo restas ... slava”; kaj se alia ⁸⁾ pli detale asertis, ke „la influo de la rusa kaj pola lingvoj akcentiĝas precipe en la fonetiko kaj sintakso, parte en la vortaro, sed ankaŭ en la afiksaro”.

Ni intencas laŭsisteme ekzameni ĉi tiujn asertojn, kaj, preterlasante hazardajn koincidojn aŭ kontaktojn kun aliaj, de Zamenhof ne lernitaj, lingvoj, eĉ ekster la hindo-eŭropa familio (kiuj, kiel atentigis Profesoro ⁹⁾ Collinson, estas sufiĉe multaj), fiksi kiaj estas la diversaj ingrediencoj en la genia kunfandaĵo kreita de Zamenhof.

FONETIKO

Ni citu tuj la opinion de la famekonata fonetikisto Jespersen, laŭ kiu plaĉis al Zamenhof sibilantoj kaj diftongoj pro lia slava gepatra lingvo ¹⁰⁾. El la sibilantoj (*c, ĉ, ĝ, ĵ, s, ŝ, z*) ĉiuj efektive troviĝas en R ¹¹⁾ kaj P, sed *ĉ, ĝ, z* apartenas ankaŭ al A (kiun Zamenhof scipovis legi); *s, ŝ* ankaŭ al FGA; *ĵ* ankaŭ al FA. Do nur *c* restas propra al la slavaj lingvoj ^{a)}. El la diftongoj RP havas *aj, ej, oj, uj, aŭj*; kaj P havas ankaŭ *eŭj*; sed en la strikta senco diftongoj tute mankas al P, ĉar ĉiu vokalo estas aparte elparolata ¹²⁾. Ĝuste pro tio Zamenhof devis indiki la diftongojn pere de la signo \sim sur la konsonanta U (kun la sono de la pola Ł), kiun signon li sendube prenis el R, kie ĝi estas

uzata sur la duonvokalo *и*, kiam tiu formas diftongon. Cetere, *aj* kaj *ej* ^{b)} estas (se ni ignoras nuancojn ŝuldatajn al diftongiga tendenco) komunaj al GAF, *aŭj* kaj *oj* al GA, *uj* al GF. La rusan *-ij-* Zamenhof ne transprenis. Do nur *eŭj* kaj la litero *ŭ* restas kiel sendube slavdevenaj.

El la resto de la alfabeto la vokaloj estas komun-eŭropaj, t.e. duonvoje inter la plene fermitaj kaj la plene malfermitaj. (Malfermado de vokalo ne havas semantikan valoron, kiel ĉe franca kaj itala *o* kaj *e*). Inter la ne-siblaĵoj konsonantoj la uvula *h* troviĝas en la germana kaj hebrea lingvoj, sed la esperantaj vortoj kiuj havas ĝin montras, ke Zamenhof prenis ĝin el R. ^{c)} La havado de senvoĉa glota frikativo *h* distingas Esperanton nete disde la latinidaj lingvoj. La akcento sur la antaŭlasta silabo povas deveni nur de P. La tiel valora kaj tiom prikriaĉita supersigno \wedge ŝuldas sian formon sendube al la slava (precipe ĉeĥa) inversa circonflekso, kaj devis ŝajni tute natura al pol-lingvano al kutimigita al kvin supersignitaj konsonantoj. Ĝia rajtigo tamen konsistas en tio, ke ĝi ebligis al Zamenhof kunigi la okulan kaj orelan rekoneblecon, tiel ke, kiel Couturat diris, ĝi „harmoniigas la fonetismon kaj la grafismon”; ekz. *garden* (AG)/*jardin* (F) vidiĝas kaj aŭdiĝas en *ĝardeno*. Do fonetike Esperanto ŝuldas rekte al RP nur *c, h, eŭj, -ŭj*, la akcenton, kaj eble la ideon pri la supersigno.

MORFOLOGIO

Artikoloj: Forlasinte slavecon rilate la difinan artikolon, Zamenhof kompensis la slavojn, ne enkondukante la nedifinan. Ĉu estis necese, tiel kompensi ilin, estas dube; ĉar ĝuste la slavoj kontraŭstaris la postan proponon, forigi la difinan artikolon ¹³⁾. Ties formon Zamenhof elektis kredeble el la franca.

Substantivoj: La finaĵo *o*, kvankam ĝi koincidas kun tiu de la neŭtraj substantivoj en RP, devenas pli verŝajne de sia uzo en la itala lingvo por ĉiuj substantivoj virgenraj el la latina dua deklinacio. Pri la sugesto de Stojan, deveniganta ĝin el la antaŭa projekto de Deria, ni restas skeptikaj ¹⁴⁾.

Akuzativo: Kredeble la fakto, ke ankaŭ G havas ĝin, decidigis Zamenhof sekvi ĉi tie la slavajn lingvojn; kaj sendube la litero *-n* sin trudis pli el la germana virgenra formo ol el la greka vir- kaj ingenra, kiun li ankaŭ konis. La manko de aliaj kazoj devis meti Esperanton firme inter la nefleksiajn (senkazajn) lingvojn kiel la anglan kaj francan. Fleksio en Esperanto troviĝas nur kun la sufiksoj *-ĉj* kaj *-nj* ¹⁵⁾.

Vortgenro: Ke malgraŭ la tri vortgenroj de RPG ĉi tiu tute mankas al Esperanto, pruvas kiel neligita *Z a m e n h o f* estis al siaj kutimaj lingvoj. La principo de maksimuma facileco necesigis la forĵeton de ĉia balasto.

Pluralo: Vokala finaĵo akordas kun RP; kaj la litero *-j* havas la avant-aĝon, ke ĝi formas facile elparoleblan diftongon, kiu troviĝas ankaŭ en la klasika greka lingvo. Kontraŭ la alia kandidato, *-s* (uzita en la „*Lingwe Uniwersala*” de 1878) levis sin la fakto, ke Esperanto havas jam sufiĉe da siblaj sonoj.

Adjektivoj: La finaĵo *-a* estas slava por la ingenraj adjektivoj, kaj ĝia simila uzo en la greka, latina, kaj kelkaj latinidaj lingvoj estis verŝajne la decidiga faktoro. Konkordo inter substantivo kaj adjektivo rekomendis sin per tio, ke tiamaniere Esperanto fariĝis bona enkondukilo en la lingvajn studojn. Sed kie severeco ne utilas, *Z a m e n h o f* ne volis esti pedanta; do la difina artikolo restas nevaria.

Adverboj: La finaĵo *-e* estas kaj slava kaj latina; *-aŭ* ŝajnas esti artefaritaĵo, kiu devis harmoniigi radikojn prenitajn el diversaj fontoj. El la 38 sendependaj adverboj nur unu estas slavdevena, t.e. *nepre* (R). La disdivido de la aliaj estas jena:

	F (17)	G (9)	L (6)	A (2)
adiaŭ	plej	ajn ¹⁸⁾	eĉ	jes
apenaŭ	pli	baldaŭ	hodiaŭ	ĵus
ĉi	plu	des	jam	
denove	preskaŭ	for	jen	
hieraŭ	tre	ja	supre	itala (3)
mem	tro	ju	tamen	
ne	tuj ¹⁷⁾	morgaŭ		almenaŭ
nete ¹⁶⁾	volonte ¹⁶⁾	nun		ankaŭ
parkere ¹⁶⁾		nur		ankoraŭ

Prepozicioj: La 34 disfalas jene:

	L (18)	F (8)	G (3)	RP (3)
apud	per	al	anstataŭ	krom
antaŭ	post	ĉe	je	po
ĉirkaŭ	preter	de	laŭ	pri ²²⁾
(dum) ¹⁹⁾	pro	en		
ekster	sen	ĝis ²⁰⁾		
el	sub	malgraŭ	A (1)	itala (1)
inter	super	por		
kontraŭ	tra	sur	spite ²¹⁾	da
kun	trans			

Do nur 3 estas slavdevenaj.

Konjunkcioj: La 5 kunordigiloj estas distribuitaj jene: L 3 (aŭ, nek, sed); F 1 (do); Grek. 1 (kaj). Do RP liveras eĉ ne unu.

Subjunkcioj: La 8 subordigiloj devenas jene: L 4 (dum, kvankam, kvazaŭ, se); F 2 (ĉar, ke); G 1 (ol); P 1 (ĉu). *Z a m e n h o f* tre lerte prenis la polan vorton en ambaŭ ĝiaj uzoj, subjunkcia kaj rekte demanda.

Personaj Pronomoj: Pro la simileco ekzistanta inter la diversaj membroj de la hindo-eŭropa familio, estas malfacile decidi, el kiu lingvo ĉiu pronomo fontas. Laŭ la kriterio de rekonebleco tamen, oni povas distribui ilin jene:

LF (3)	L (1)	A (1)	LFRP (1)	LFAGRP (1)
li	ambaŭ	ŝi	vi	mi
ni				
ili	FA (1)	P (1)	LFGRP (1)	artefarita
	oni	ci	si	ĝi

La pronomo el LFRP koincidas ekzakte kun la itala akuzativa-dativa formo. Specialan pronomon de ĝentileco, kia ekzistas en itala kaj hispana lingvoj, *Z a m e n h o f* elpensis sed poste forigis; kaj preferante ke Esperanto ne havu tiajn embarasajn distingojn, li ankaŭ ne imitis PG en la uzo de la 3a persono por alparoli iun.

Korelativaj Pronomoj kaj Adverboj: Oni kutimas nomi ĉi tiujn 45 vortojn „arbitre elpensitaj”, sed iliaj elementoj tute ne estas hazarde elektitaj. La komenca litero *ĉ-* bone povus esti el P *wyszyscy* (ĉiuj); la finaĵo *-ie* memorigas pri P *gdzie* (kie); kaj la komencaj *k-* kaj *t-* redonas la demandan, relativan, kaj montran formojn de pluraj tiaj vortoj en RP, dum la *k-* akordas ankaŭ kun F (*qu-*) kaj la *t-* ankaŭ kun A (*th-*) kaj F (*tel, tant*). La negativa *nen-* estas komuna al ĉiuj. La posesiva finaĵo *-es* akordas kun la genitivo en GA, ne nur laŭ formo, sed ankaŭ en la uzo; ĉar la provo farita de fruaj francaj verkistoj, por ke *kies* egalu la francan *dont* kun ties ne-genitivaj sencoj, ofendis la lingvan senton de aliaj verkistoj, kaj tiu uzo estas nun tute forlasita²³⁾.

Verboj: Pri la origino de la verbaj finaĵoj ni ne estas, laŭ mia scio, precize informitaj; sed ilia taŭgeco estas tia, ke oni povas fari tre kredablajn konjektojn. Nome, la *a* de la prezenco estas karakteriza por la sama tempo de la unua konjugacio en RP kaj L; la *i* ŝajnas indikita por la perfekto-preterito pro tio, ke ĝi estas la fina vokalo de la unua persono de ĉiuj latinaj perfektoj; simile la *o* de la futuro trafe koincidas kun la finaĵo *-bo*²⁴⁾ de la latina futuro; la *u* de la kondicionalo redonas la sonon de la angla kondicionala helpverbo (*would*); ke la infinitivo finiĝas per *-i*, akordas kun latinaj pasivaj formoj; do nur la fina *-u* por konjunktivo kaj imperativo estas arbitra, tamen ne sen-

kaŭza, ĉar la manko de alia vokalo devigis al alia metodo, t.e. forigo de fina konsonanto. Havi nur unu finaĵon por la volitivo estis lerta ŝparaĵo, rajtigita de la fakto, ke en multaj lingvoj ordonoj en la 3a persono estas farataj per la konjunktivo. La fina litero *s* estas kompreneble arbitra, sed ankaŭ ĉi tie oni vidas la gvidantan ideon, ke necesis havi finan literon, kiu ne troviĝas tiel uzata aliloke en la lingvo. La participa finaĵo *-nt* estas LF; kaj la ellaso de *n* por fari la pasivon donas *-at* kaj *-it*, kiuj estas la normalaj latinaj kaj italaj participaj sufiksoj. Tiamaniere *-ont* kaj *-ot*, kvankam arbitraj, kreskas nature el la tute „naciaj” formoj, - fenomeno karakteriza de ĉiuj Esperantaj artefariĵoj.

Slavdevenaj estas la jenaj trajtoj: 1. Unuigo de preterito, imperfekto, kaj perfekto en unu formon; 2. ne-uzo de „havi” kiel helpverbo kaj formado de kunmetitaj tempoj pere de „esti”; 3. distingo inter participoj adverbe, adjektive, kaj substantive uzataj; 4. ebleco diferencigi la perfektan disde la neperfekta aspekto. Ĉi tiu lasta trajto estas tre subtile enkondukita; kaj povas esti, ke *Zamenhof* eĉ ne intencis enkonduki ĝin, sed la unuaj slavaj verkistoj malgraŭ si trovis en Esperanto la rimedon esprimi tiun nuancon tiel nedisigeble ligitan al iliaj pensmanieroj. Du rimedoj estis disponeblaj: la *ata/ita* participaj finaĵoj, kaj la afiksoj *-ad-* kaj *ek-*. Rilate la unuan, la Zamenhofa uzado en la Malnova Testamento estas klarigebla nur per ĉi tiu distingo; rilate la duan, la verboj elektitaj en U.V. por montri la signifon de *-ad* kaj *ek-* estas respektive neperfekta kaj perfekta²⁵⁾. Post ĉi tiu konstato decas ankaŭ diri, ke la enkonduko de konjunktiva modo estis tute nefavora al la slavo, kiuj nekonscie venĝis sin, ofte uzante anstataŭ ĝi la al ili kutiman kondicionalon.

Afikso: La disdividiĝon plej bone montras tabelo:

L (9)	F (8)	G (2)	RP (3)	LFARP (2)
dis-	bo-	ge-	pra-	-an
ek-	-em	-ig ²⁶⁾	-ĉj ²⁷⁾	-ar
eks-	mal-		-nj	
re-	-ad			
-ebl	-aĵ	A (1)		<i>necertaj</i> (7)
-id	-et		R (1)	
-ind	-il	-ing ²⁸⁾		-eg
-obl	-uj ³⁰⁾		-ej ²⁹⁾	-er
-ul ³¹⁾				-estr
		<i>itala</i> (1)		-iĝ
	FA (1)		FGRP (1)	-on
		-ec		-op ³²⁾
	-ist		-in	-un.

Do el la 36 afiksoj nur 4 certe estas slavdevenaj; kaj el ĉi tiuj *-ej* havas similecon kun G *-ei*. Simile *-il* retroviĝas, eble hazarde, en kelkaj rusaj vortoj signifantaj ilon³³⁾. Povas esti ankaŭ, ke la iom stranga uzo de *-ujo* por landnomoj estis helpata de la rusa finaĵo *-ija*.

Vort-kunmeto: *Stojan* certe pravas, dirante³⁴⁾ ke multaj fruaj kunmetaĵoj estas slavdevenaj. Sufiĉas ĉi tie aludi al la uzo de *sen* kiel prefikso, kiu reprezentas la slavan tre oftan prefiksitan prepozicion *bez*; kaj al tiu de *pri*, kiu povas tiel ŝanĝi la signifon de verbo, ke ĝi rilatas rekte la antaŭe nerektan objekton (ekz. ŝteli ion/priŝteli iun; ĵeti ion/priĵeti iun; verŝi akvon/priverŝi floron; semi semon/prisemi teron)³⁵⁾. Sed sian memstarecon (aŭtonomion) en la vortfarado kaj derivado Esperanto ŝuldas ne malpli al la germana ol al la slava fono.

El ĉi tiu analizo klare montriĝas, ke ankaŭ el morfologia vidpunkto Esperanto ŝuldas malmulton ekskluzive al la slavaj lingvoj: precize 23 erojn³⁶⁾ kontraŭ 188 (el kiuj du, nome la difina artikolo kaj la konjunktivo estas eĉ kontraŭ-slavaj). Se ni aldonos al ĉi tiuj nombroj la fakton, substrekitan de *Drezen*³⁷⁾, ke „formale ĉiu esperanta lingvo-elemento troviĝas en la vortaro”, ni devas ankaŭ konsenti je ties konkludo, ke „tia morfologia strukturo de Esperanto estas tre parenca al lingvoj malproksim-orientaj monosilabaj (ĉina) kaj speciale al la lingvoj aglutinaj (turk-tataraj)”.

VORT-TREZORO

Zamenhof mem diras³⁸⁾ al ni, ke la vortoj de Esperanto „krom kelkaj tre malmultaj, ne estas arbitre elpensitaj, sed prenitaj el la lingvoj romana-germanaj”, kaj li aldonas tre detale la motivojn, pro kiuj la vortaro de internacia lingvo nepre devas deveni de tiuj lingvoj. Valoras la penon, fari statistikan ekzamenon de la Universala Vortaro, por konstati ĝis kia grado ĉi tiu aserto estas vera, kaj taksi tiel la tujan rekoneblecon de la Esperanta vort-trezoro. (Vidu la tabelon je la fino).

Povas ŝajni strange, ke en la du supre cititaj lokoj *Zamenhof* ne aludas la kontribuon de la slavaj lingvoj; sed kiam oni ekzamenas la U.V., oni konstatas, ke fakte ili kontribuas tre malmulte. El la 2612 radikoj³⁹⁾ la sumo de la pure slavaj estas nur 29, kiuj dividiĝas jene: R⁴⁰⁾10; P⁴¹⁾7; RP⁴²⁾12. Se ni komparas kun ĉi tiuj ciferoj la kontribuon de la pure germana grupo, 326 (G 140; A 111; AG 75) kaj de la pure latinida (romana), 861 (L 383; F 401; LF 38; Ital. 39), ni konstatas sufiĉe grandan diferencon; kaj se ni poste aldonos la mikse latinid-germanan grupon de 663 radikoj devenantaj de L sed adoptitaj de G aŭ A aŭ ambaŭ, ni atingas ciferon de 1850 vortoj tute fremdaj por la neklera slavo, t.e. iom pli ol 66 % aŭ du trionoj de la tuta vortaro. Bonŝance, dank’ al la prestiĝo de la franca lingvo, multaj (537) latinidaj

vortoj penetris en la slavajn lingvojn aŭ sole aŭ samtempe kun penetra en la ĝermanajn (506); kaj simile penetris en ilin 117 ĝermanaj (teŭtonaj) vortoj (G 64; A 16; AG 37). Do en la cetera triono de sia vortaro Z a m e n h o f povis etendi la tujan rekoneblecon ankaŭ al la slavo, tiamaniere kreante vere eŭropan leksikonon.

Efektive, la U.V. bone spegulas la lingvan historion de Eŭropo. Estas sciante ekzemple, ke la slavaj lingvoj estis pli rezistemaj ol la ĝermanaj al la enpenetro de la latina kaj de la franca lingvoj; do nenio miriga, se ĉi tie ni trovas, ke ili havas nur 537 prunteprenitajn vortojn, kontraŭ la 1169 kiujn prenis la ĝermana grupo, kaj ke la plimulto de ĉi tiuj (506) troviĝas ankaŭ en AG, do povis alveni pere de tiuj lingvoj. Plue, el la du koncernaj slavaj landoj, estas sciante, ke Polujo estis pli malfermita al okcidentaj influoj ol Rusujo. Ankaŭ ĉi tiu fakto montriĝas el niaj ciferoj: el GA - P prenis 38, R 29; el LF - P prenis 16, R 5; el LFAG - P prenis 128, R 60: do entute P 182, R 94. Aŭ ni rigardu la rilaton de G kaj A al la latina. A, dank' al la normandoj, absorbis multege da francaj vortoj kaj tial povis poste abunde adopti la latinajn preskaŭ senŝanĝe. Tiel sen miro oni trovas, ke la koincidoj kun LF por A kaj G estas respektive 535 kaj 43. Simile la franca enfluo en la anglan lingvon bone montriĝas el la alta nombro (479) por radikoj komunaj al ambaŭ lingvoj. Nenio pli konvinke ol ĉi tiuj faktoj povus pruvi al ni la ĝustecon de la kriterio laŭ kiu la Esperanta vortaro kompiliĝis. Komprenibile, ĉi tiu historia akordo ŝuldiĝas grandparte al la fakto, ke la U.V. ne estas kabineta kreaĵo, sed prezentas la efektivan staton de la vortaro, kia ĝi estis en la tiutempa literaturo (ĝis 1893).

Restas ion diri pri la tiel nomataj „volapükismoj”, - termino fabrikita por malŝate aludi tiujn Esperantajn vortojn, kiuj ne devenas de la naciaj lingvoj, sed estas „arbitre elpensitaj”. (Efektive, tio estas iom nejusta rilate al Volapük, ĉar tie la vortoj estas ja prenitaj el la naciaj lingvoj, sed ŝanĝitaj ĝis nerekonleco laŭ ia fonetika principo⁴³). Strange estas, ke inter 1878 kaj 1887 (do ĝuste dum la triumfo de Volapük) Z a m e n h o f modifis sian „Lingwe Uniwersala” en la konvinko, kiel li mem skribas „ke por la vortoj fundamentaj (t.e. plej multe uzataj en la ordinara vivo) la nacilingva aspekto ne sole ne estas necesa, sed estus eĉ rekte malhelpa”; kaj li argumentas, ke la novaj vortoj ne estas „tute elpensitaj”, ĉar ili estas „vortoj naturaj alkonformigitaj al mia tiama principo”⁴⁴). Bonŝance, Z a m e n h o f reiris al sia originala ideo. En 1888 li nomas Volapük „lingvo arbitre elpensita” kaj konsistigas la superecon de Esperanto en tio, ke „la vortaro ne estas kombinita arbitre, sed kompilita tiamaniere, ke ĉiu vorto estu pli aŭ malpli konata al ĉiu pli aŭ malpli klera homo”⁴⁵). Ĝuste pro tio li nomas senhezite sian lingvon „tutmonda”, ĉar, diference de Volapük, ĝi jam laŭ esenco estis tia⁴⁶).

Kial do li enmetis en Esperanton vortojn, kiuj ne havas originon en iu nacia lingvo? Tion Z a m e n h o f plurfoje klarigas⁴⁷). La principo de kiel eble plej malgranda ŝanĝado de la naciaj vortoj, kvankam ĝi estas tre grava, tamen ne estas la plej grava el tiuj, al kiuj devas obei internacia lingvo. Estas signife, ke la plej laŭtaj postulantoj de tia principo estas lingvistoj kaj poliglotoj⁴⁸), kiuj jam konas plurajn, precipe latinidajn kaj eŭropajn, lingvojn, kaj tial ofendiĝas kiam ili renkontas vorton ne tuj rekoneblan. Sed internacia lingvo estas farita unualoke por la meza homo de la tuta mondo, kiu ne konas aliajn lingvojn; kaj por li la facileco dependas, ne de la tuja rekonebleco (kiu ne povas esti), sed de la reguleco kaj la interna logikeco de la vortoj. Ĉi tiu kvalito ebligas al li, ne nur rapide legi, sed ankaŭ rapide skribi kaj paroli la lingvon. La tiel nomata kaj tiom laŭdata „tuja komprenleco” estas kio ĝin nomis d e B e a u f r o n t⁴⁹) en Marto 1907, „tromptlogilo”. La unika merito de Esperanto estas, ke ĝi sukcesis harmoniigi la du principojn de internacieco kaj reguleco. Z a m e n h o f prikskribas tre klare sian procedon⁵⁰): „La lingvo Esperanto estas kreita en la sekvanta maniero: estas prenitaj la plej konataj vortoj de la lingvoj arjaj kaj tre garde preparitaj tiel, ke ili alformiĝu al absolute regula gramatiko, ortografio kaj praktika uzebleco, kaj ke la vortoj kaj formoj ne venu en kolizion unu kun alia.” Li neniam bedaŭris ĉi tiun metodon. Se en 1905 (kiel en 1894) li metis la korelativan tabelon inter la ŝanĝindaĵojn, tio estis nur por kontentigi sian amikon J a v a l, kaj malpli ol unu jaron poste li ŝanĝis ideon kaj diris al J a v a l, ke „tio ĉi estas granda eraro Certa nombro da tiaj arbitraj vortoj estas absolute necesa”⁵¹).

Do la apriora elemento en Esperanto estas agnoskita de Z a m e n h o f kaj de li rajtigita. Sed kion oni devas kompreni per „arbitre elpensita”? Ĝisfundaj naturalistoj parolas kvazaŭ „arbitre” estus samsignifa kun „kaprice”. Ni submetu la „volapükismojn” al ekzameno, klasifikante ilin jene:

1. Tiuj vortoj, kies fina silabo devis suferi modifon por eviti kolizion kun alia Esperanta vorto. Plejparte tio koncernas radikojn finiĝantajn per *-n*, *-er*, *-et*, *-il*, *-ul*, kiuj silaboj havas en Esperanto sufiksvaloron. De tio ekzemple *faruno*, *vipuro*⁵²), *planedo*, *mirtelo*, *petola*. Ofendiĝi je ĉi tiuj ŝajnas iom tro! Malpli rekoneblaj estas radikoj, kies vokalo aŭ konsonanto devis esti ŝanĝata pro la sama kaŭzo, ekz. *pego* (pro *pigo*), *pigo* (pro *piko*), *voĉ* (pro *vok*).

Ĉu tian lertan eviton de homonimoj oni devas nomi „arbitra”?

2. Vortoj parigitaj per duobla derivado de unu sama radikoj por redoni semantikan diferencon, ekz. per variado inter voĉa kaj senvoĉa konsonantoj: *pesi/pezi* (F peser). Ĉi tiuj ŝajnas esti la solaj postrestintoj el primitiva fazo de la lingvo⁵³). Eble ni povus ĉi tie klasifiki:

pli/plu/plej (F plus), kaj *je/ju* (G je). La paro *trinki/drinki* ne egalas, ĉar ambaŭ ekzistas (G trinken, A drink).

3. Tiuj vortoj kiuj prezentas kunfandiĝon de du devenoj: ekz. *draŝi* (G dreschen, A thrash)⁵⁴), forgesi (G vergessen, A forget). Ankaŭ ĉi tio postrestas el tre frua fazo de la lingvo.

4. Amputitaj vortoj, ekz. *triki* de F tricoter, kiu donis ankaŭ *trikoto* (trikita teksaĵo). Tiaj formoj estas malmultaj, ĉar *Z a m e n h o f* ne konsideris unusilabecon nepre merito⁵⁵).

5. La korelativoj. Por la naturalistoj ĉi tiu tabelo estas la fina pruvo de la netaŭgeco de Esperanto. Kaj tamen la granda klasikisto kaj filologo⁵⁶), Profesoro *M a y o r* el Kembriĝo, diris pri ĝi: „Mirinda estas la eltrovo de la tabelo; mi ne povas sufiĉe ĝin admiri; certe via Majstro estis granda geniulo”. Ni jam montris supre, ke la diversaj formoj ne estas tiel arbitraj kiel ili unuavide ŝajnas, ĉar ĉiu litero havas sian motivon⁵⁷). Ĉiuj lingvoj havas ian gradon de reguleco rilate ĉi tiujn logike inter si rilatantajn ideojn⁵⁸); Esperanto, celante la plej grandan facilecon por ĉiuj, devis evidente havi la maksimuman regulecon, t.e. devis krei la mankantajn formojn. Ĉu kaprico kaj ne la plej fera logiko gvidis la kreanton de ĉi tiu tabelo? Kiam ni komparas la koncernajn formojn de Ido (kiujn poste sekvis la pli naturalistaj projektoj Occidental kaj Novial), ekz. *kande* (kiam), *lor* (tiam), *sempre* (ĉiam), *olim* (iam), *ube* (kie), ni havas impreson de haoso. Jen kio estas arbitra en la vera senco; ĉar kvankam la vortoj devenas el naciaj formoj (rekoneblaj al klerulo kaj tial trompe facilaj), la elekto mem estis tute kaprica, sen ia videbla kriterio.

6. Kelkaj afikse kunmetitaj vortoj. *Reĝino* estas akceptebla eĉ al naturalistoj, ĉar ĝi koincidas kun naciaj formoj; sed *bovino* ŝancelas ilin, kaj kiam ili vidas *patrino* kaj *virino*, ili tute perdas la ekvilibron. Tiel ili proklamas, ke ili ne volas regulecon, sed preferas malfacilecon, - pridubinda kvalito ĉe kreontoj de lingvo internacia. Precipante malamon ili rezervas por la *mal*-vortoj, ne nur pro tio, ke ĉi tiuj anstataŭas kelkajn formojn tre bone konatajn al eŭrop-lingvistoj, sed ankaŭ ĉar la akcento restas sur la sama silabo kiel ĉe la originala vorto, ekz. *fermi/malfermi*. Sed nomi la uzon de tia prefikso arbitra, ni certe ne rajtas. La franca lingvo, de kiu *Z a m e n h o f* prenis ĝin (ekz. *mal-sain, malheureux*), restis ĉi tie fidela al sia origino.

En Latino oni trovas ne malofte adjektivon, kies signifo estas renversita per la antaŭa „*male*”: por citi nur unu ekzemplon, *Virgilio*⁵⁹) nomas *Did'o'n „male sana”*, kio, eĉ se ĝi estas malpli forta ol „*insana*”, tamen indikas kiel la uzo povas evolui. Kaj fakte ĝi estas tre populara prefikso en la itala regiona lingvo, la Friula. Rilate la akcenton, sufiĉas citi el la germana lingvo la paron *achten/verachten*. Neniu trovas, ke *verachten*, pro tio, ke ĝi ripetas la silabon *acht-* kun la sama akcento, ne povas esprimi la plej profundan malestimon. Oni

povus iri eĉ pli malproksimen kaj apelacii al la afrika lingvo nomata Svahili, kie sufikse enmetita vokalo *u* sufiĉas por renverse aliigi la sencon, ekz. *fumba* (fermi) / *fumbua* (malfermi).

7. La tiel nomataj retro-formaĵoj⁶⁰), ekz. *fraŭlo, kuzo*. Hazardo volis, ke la lasta silabo de ĉi tiuj du vortoj en ilia originala formo (*Fräulein, cousine*) pli-malpli ehu la Esperantan sufikson *-in*; el kio spontane naskiĝis la rilataj virseksaj formoj. Ĉu do tiuj formoj estas monstroj? Ni memoru, ke en la angla lingvo oni kreis kaj antaŭ kelkcent jaroj ankoraŭ uzis la plimallongigitan formon, *cuŝ*; kaj ke la germana radiko *frau* fakte havis virseksan formon, kiu aperas en la gota *frauja* kaj postrestas en la malofta modern-germana vorto *Fron* (Sinjoro). Do en la Esperanta vorto *fraŭlo* nur la litero *l* estas arbitra; kaj eĉ tio, kiel cetere ĉio en Esperanto, naskiĝis nature el la kreskpovo de la lingvo mem.

Alia tia vorto tamen bezonas apartan atenton. La vorto *edzo* ne nur estas retro-formaĵo el *edzino*, sed *edzino* mem havas nenion komunan kun iu nacia lingvo. Laŭ *Z a m e n h o f*⁶¹) ĝi devenas el la germana *Prinzessin*: sed ne ĉiu princino estas edzino kaj eĉ malpli ofte edzino estas princino, kaj krei vorton el nur parto de alia malsamsignifa vorto estas io tute nekutima ĉe *Z a m e n h o f*. Supozeble pro tio⁶²) oni eĉ riskis la aserton, ke la radiko efektive devenas el pola vorto „*jedzyna*”, kiu signifas „virinaĉo” kaj tiel perfidas la sintenon de *Z a m e n h o f* rilate la virinojn. Ke *Z a m e n h o f*, amanta filo kaj amanta edzo, povis tiel senti kaj tial elekti radikon, jen io, kion ni tute ne kapablas kredi. Sed *edzo* kaj *edzino* restas la solaj vere arbitraj vortoj en la Esperanta leksikono⁶³). Nun tamen ni konstatas ion strangan. Ĝuste tiuj du vortoj estas inter la plej vivaj kaj sentplenaj en la tuta Esperanto! Eble nur kiu uzas Esperanton en la enfamilia vivo povas vere sperti ĉi tion; sed spertinte, tiu konscias ekster ĉia dubo, ke la lingva deveno tute ne gravas, kaj ke eĉ la plej artefarita vorto povas alpreni la subtonojn de la sento. Se Esperanto havas animon, ĝi havas ĝin, ne spite de, sed dank'al, siaj „arbitre elpensitaj” vortoj.

SINTAKSO

Iuj subjunkciaj kunmetaĵoj evidente imitas F (kaj Italian): *por ke, malgraŭ ke, ĝis kiam, ĉiufoje kiam*; egale F (kaj Itala) estas: *apenaŭ* kiel tempa subjunkcio⁶⁴ (= *tuj kiam*); *lasi sin* kun aktiva infinitivo⁶⁵); infinitivo post verboj de percepto⁶⁶). (*Antaŭ ol*, kvankam ĝi havas ekvivalentojn en F kaj L, devenas verŝajne el R).

Malmulto ŝuldiĝas al G: ekz. la malofta (kaj evitenda) uzo de *lasi* kun aktiva infinitivo por signifi *igi*⁶⁷); kaj la uzo de *nur* en nedefinitaj aŭ universalaj frazoj⁶⁸). La uzo de substantivaj frazoj kun *ke* dependa de *tio* post prepozicio estas tipe germana, sed troviĝas ankaŭ en RP⁶⁹).

Fakte, se ni ekzamenas la plej karakterizajn regulojn de la Esperanta

sintakso, ni trovas, ke ili ĉiuj devenas el la slavaj lingvoj. Ni povas enlistigi ilin jene:

1. Manko de renverso en demandaj frazoj.
2. Nominativo por la predikata komplemento ⁷⁰).
3. Tempo de rekta parolo post preterita ĉefverbo en nereakta frazo ⁷¹).
4. Akuzativo por daŭra tempo ⁷²).
5. „Estas al mi varme” ktp. ⁷³).
6. Manko de absoluta participa frazero (vidu LR 19).
7. Kondicionalo post *kvazaŭ* (kun escepto de iuj okazoj).
8. Kondicionalo post *se* en nerealaj kondiĉoj ⁷⁴).
9. Kondicionalo post negativa pronomo aŭ negativa adverbo en ĉefa frazo ⁷⁵).
10. Simpla anstataŭ perfekta kondicionalo en nerealaj kondiĉoj ⁷⁶).

Al ĉi tiuj fundamentaj reguloj, kiuj nete distingas Esperanton disde okcident-eŭropaj lingvoj, ni povas aldoni tiujn, malpli devigajn, kie la influo de RP sentigas sin negative: ekz. la antaŭjuĝo kontraŭ *sen* kun la infinitivo aŭ kun la konjunkcio *ke* (kun aŭ sen konjunktivo) ŝuldiĝas sendube al tio, ke tia uzo ne ekzistas por la slava *bez*.

Ĉar Esperanto solidiĝis sub la gvidado de slavaj aktivuloj en la unua periodo (1887-1895), estis neeviteble, ke en la lingvon enŝteliĝis ankoraŭ aliaj slavismoj; kaj ne ĉiuj estas forigendaj. Se la Esperantistaro tre baldaŭ decidis, ke ĝi ne volas la akuzativon post substantivo havanta verban forton (ekz. *la vastigado ĝin* ⁷⁷), nek *sed* anstataŭ *tamen* post *kvankam*-frazo ⁷⁸), nek *kvankam* mem kiel adverbosignifantan „ja certe” antaŭ *sed*-frazo ⁷⁹), ĝi tamen bone povas akcepti la uzon de la infinitivo tuj post *ordoni* (sen ties objekto) ⁸⁰), eĉ se ĝi kuntenas la iel neregulan uzon de la refleksiva pronomo, jam de iuj kondamnitan post *lasi* ⁸¹). Sed nepre evitenda estas la enmeto de superflua *ne* post *ĝis* ⁸²) kaj *timi, ke* ⁸³), kvankam tio okazas aŭ povas okazi ankaŭ en la franca kaj itala lingvoj.

El ĉio ĉi oni vidas, ke sintakse Esperanto staras proksime al la slavaj lingvoj, kaj povus stari eĉ pli proksime sen perfortado de sia esenco. El tio kion *Zamenhof* konscie enmetis en Esperanton, malmulto estas slavdevena; sed tuj kiam la diversaj elementoj devis kuniri en frazoj, la slava pensmaniero havis neeviteble la superecon. Malantaŭ la latina fasado kuŝas la slava mekanismo.

Resume, nia ekzameno montris al ni, ĝis kia mirinda grado Esperanto estas kunfandaĵo de diversaj lingvaj elementoj. Fonetike neŭtrala, morfologie eŭropa, ĝi favoras okcidentan Eŭropon laŭ vortaro kaj orientan Eŭropon laŭ sintakso, kaj samtempe laŭ interna strukturo konformiĝas al lingvoj ekster-eŭropaj. Prave do oni povas nomi ĝin kun ⁸⁴) *Drezen* „efektive internacia, interlingve konstruita”; kaj el ĉi tiu mirinda hibridiĝo Esperanto tiras sian forton kaj sian taŭgecon por la rolo de Internacia Lingvo ⁸⁵).

NOTOJ

- 1) *Universo*, 1911, p. 162. 2) *Kp. Wajsblum*, *Esperantologio* 1 p. 204-5: Lia deviga lerna kaj ofica lingvo en tiama Białostoko kaj Varsovio estis rusa; hejme li parolis pole. Ankaŭ *Zakrzewski*, kiu konis lin, nomas lian hejmlingvon pola (*Universo* 1911, p. 180). 3) En kiu lingvo tamen li sonĝis? Supozeble en la germana, se la Esperanta artikolo ankoraŭ ne estis kreita. 4) *Kotzin*, *Historio kaj Teorio de Ido*, p. 103. 5) *O.V.* p. 242. 6) *Letero al Michaux* de 1905 (*Waringhien*, No. 92). Li aldonas, ke li parolas ankaŭ germane kaj legas libere france. 7) *Stojan*, *Deveno kaj vivo de Esperanto*, pp. 31-32 (= *Esperanto*, 1937); kaj *kp. prelegon de Profesoro Collinson* antaŭ S.B.E.T., 1947 (*Esp. Internacia* 1947, p. 21). 8) *Wajsblum*, lok. cit., 1951. 9) *Esperantologio* 1, p. 82 (1950). 10) *Stojan* konsentas (lok. cit. 31): „oftaj diftongoj tipaj por lia patrinlingvo”. 11) *R* la rusa lingvo, *P* pola, *A* angla, *G* germana, *F* franca, *L* latina. a) Ĝi ankaŭ troviĝas en *G* (Subformo *z*). (Red.). 12) *Wicherkiewicz*, *Polnische Konversationsgrammatik*. b) Fakte la esperanta sono „ej” mankas en *G*. (Red.). c) La respondaj germanaj vortoj preskaŭ ĉiuj havas la saman *h*-sonon. Kredeble ankaŭ la greka lingvo influis. (Red.) 13) *O.V.* p. 154. 14) Estas pli kredeble, ke *Zamenhof* iom konis la italan lingvon (*kp. sube adverbajn kaj Vort-trezoron*), ol ke li trovis la projekton de *De Riva* en rusa biblioteko. 15) *Drezen*, *Skizoj pri teorio de Esperanto* p. 37. 16) Laŭ la *U.V.* la radiko estas adverba. 17) *de tout-de-suite?* 18) *de germana (irgend) ein?* 19) Vidu: *Rimarkigo*, p. 107. 20) *De jusque*. 21) Vidu *U.V.* kaj *B. E.* 1953, 105. 22) Kun alia senco tamen. 23) Ĝi povas tamen havi la artikolon post *si*, kiel *dont*, almenaŭ en la poezio; *kp. Hamleto* p. 6/1, 17/-3, 35/5. 24) Interese estas, ke ankaŭ *Volapük* elektis *o* por la futuro (tamen kiel prefikson). 25) Dum la 38a *U.K.* *Zagrebano* konfirmis al mi, ke li ĉiam uzas *ek-* por la perfekta aspekto. 26) Eble la ekzisto de sufikso havanta similan funkcion en la hebrea lingvo konvinkis *Zamenhof* pri ĝia utileco. 27) En *Revuo Orienta*, 1936, oni devenigas ĝin el hungara *-csi*. 28) Laŭ *Revuo Orienta*, 1937 (Nov.), la fonto estas *fingringo*. 29) Kredeble la unua Esperanta sufikso; vidu *O.V.* p. 419/5. 30) *De étui*. 31) *De -ulus*; la letero de *Zamenhof* al *Couturat* de 17.IX.05 (*War.* No. 156) signifas, ne slavan devenon, sed nur ke la slavaj lingvoj montris la neceson de tia sufikso. 32) *Wajsblum* (*Esperantologio* 1, p. 206) sugestas, ke ĝi estas *po* renversita. 33) *Pravilo* (direktilo), *kadilo* (incensilo). — Krome, ĝermanlingvanoj rekonas en ĝi samsignifan sialingvan sufikson *-el*; komp., ekz. *šlosilo* — *Schlüssel* (Red.). 34) lok. cit. p. 32. 35) *Kp. germanan prefikson be-* (ekz. *liefern/beliefern*). 36) nome: *c, h, eŭ, ŭ*, akcento, foresto de nedifina artikolo, 1 adverbo, 3 prep., 1 subjunkcio, 2 korelativoj, 4 verbaj trajtoj, 4 afiksoj, prefiksaj *sen-* kaj *pri-*. 37) lok. cit. p. 59. 38) *Esenco kaj Estonteco*, *O.V.* 302/14 (F.K. 303/10) kaj *O.V.* 308/10 (F.K. 311/8). — (En la originalo *germana* anstataŭ *ĝermana*; ŝanĝo far la redaktoro). 39) Ĉi tiun ciferon donas *Waringhien*, *Scienca Revuo* 7 139 (1955). El ĉi tiuj mi ignoris evidentmotive lokajn vortojn, kiel: *barĉo*, *stofa*, *maco*, ktp. 40) *Banto*, *barakti*, *gladi*, *kartavi*, *kreno*, *kruta*, *nepre*, *prava*, *vosto*, *-ej*. 41) *Celi*^d), *ĉu*, *krado*, *moŝto*, *pilko*, *ŝelko*, *ci*. ^d) Komp. ankaŭ la respondan germanan vorton *zielen*. (Red.). 42) *Bulko*, *ĉapo*, *ĉerpi*, *deĵori*, *kaĉo*, *klopodi*, *kolbaso*, *kranio*, *krom*, *pra-*, *po*, *pri*. 43) *Zamenhof* konfesas.

ke la aŭtoro de Volapük ne kreis „ian lingvon „Bum-bam”” (O.V. p. 275). 44) Waringhien, Let. I pp. 353-4. 45) O.V. p. 213. 46) Antaŭparolo al la Unua Libro, O.V. p. 19. 47) Vidu antaŭ ĉio O.V. pp. 96 kaj 306. 48) Waringhien, Let. I pp. 83 kaj 304. 49) Waringhien, Let. II p. 19-20. 50) O.V. p. 96; (en la originalo troviĝas la formo „ariaj”). 51) Waringhien, Let. I pp. 197 kaj 274. 52) Pli verŝajne tial ol pro preseraro; sed vidu O.V. p. 557. 53) Waringhien, Let. I, p. 352. Kp. *akord-/agord-*. 54) Waringhien, Prelego en Internacia Somera Universitato 1955. 55) O.V. 275. 56) Tiu, kiu ekkriis ĉe la 3a U.K.: „Ni vidas novan Pentekoston!” 57) Ni rimarku, ke la fina konsonanto *-m*, kiu anstataŭis *-n* por eviti kolizion kun la akuzativo, estas ŝuldita al propono de S-ro de Wahl en 1888, eks-Volapükisto, poste eks-Esperantisto, poste eks-Idisto, kaj fine kreinto de Occidental. 58) Vidu „Japana Gramatiko por Esperantistoj” pp. 8-9 kaj 42-43; kaj *Esperanto Internacia*, 1946, pp. 66-7. 59) Eneido iv. 8. El la ĉiutaga vivo Virgilio promociis la vorton al la poezio. 60) Vidu artikolon de M. C. Butler en *British Esperantist*, 1951/12. 61) LR 33. 62) Stojan lok. cit. p. 50. S-ro Applebaum, en *British Esperantist*, Nov. 1957, devenigas ĝin el la jida vorto *Rebbedzin* (edzino de instruisto). 63) Estas interese, ke S-ro Bastien, en sia Naŭlingva Leksikono, lasas nur 8 vortojn sen derivivo, kaj el ĉi tiuj 7 devenas fakte el malfrua Latino; la oka estas *edzo*. 64) O.V., p. 82, No. 32/1; Baghy, *Sur sanga tero*, p. 222. 65) O.V., p. 385/25: malmultaj lasis sin kapti. 66) *Marta*, p. 97/12: tion pri kio vi aŭdas paroli; Baghy, *Printempo en la aŭtuno*, p. 35: li sentis pereji la animon. 67) F.K., p. 53/3: li lasis fari al ŝi viran vestaĵon (Zamenhof). 68) *Rabistoj*, 70/2: tiel malproksime, kiel oni nur povis vidi; F.K., 19/-8: la plej malfeliĉa modelo, kiun oni nur povus trovi (Zamenhof). 69) Jes. 27,9: konsistas en tio, ke li faros; Zamenhof. 70) RP tamen metas ĝin en la Instrumentan Kazon. 71) Kiel ankaŭ en la klasika greka lingvo. 72) Kiel ankaŭ germane, greke, kaj latine. 73) Kie la adverbo reprezentas la neŭtran adjektivon de RP. Eble el tiaj frazoj devenas la uzo de la adverba formo post ne-persona *estas*. Cetere la sama idiotismo troviĝas ankaŭ en G. 74) GA kaj Itala uzas la Imperfektan Konjunktivon; F la Indikativon. 75) Do ne necesas supozi preseraron ĉe Eliro 12, 30: vidu *British Esperantist*, Marto 1957, p. 44. 76) Rabeno 29: se Abrahamo efektive buĉus Izaakon (kie Heine skribis „*geschlachtet hätte*”); Nomb. 22, 33; 2 Sam. 2, 27; Ps. 124, 5 (fakte la uzo estas ankaŭ hebrea). 77) La Esp. No. 1 (O.V. Faksimilaĵo, 11) kaj O.V. 39/-4. Tio povis konduki al frazoj kiel „*la disvastigado kaj enkondukado en la tuta mondo unu neŭtralan lingvon*” (O.V. 65 No. 15/2). 78) Grabowski, *Sinjoro Tadeo* 5, 733-4; O.V. p. 59/11; vidu LR 16. 79) F.K. p. 220/3 (Zamenhof); *Hamleto* p. 81/11. 80) Ekz. „li ordonis ilin vipi”, *Quo Vadis*, ĉap. xi. p. 95/17 (Lidja Zamenhof). 81) Ekz. „ili ordonis porti sin”, *Quo Vadis*, ĉap. iii. p. 34/-4. 82) Waringhien, Let. I 267/11. 83) O.V. p. 74/5, 122/-2; Luyken, *Pro Iŝtar* 94/-3. 84) Skizoj p. 59. 85) Kp. artikolon de Profesoro Collinson en *Esperantologio* 1 87 (1950) kaj lian prelegon cititan en piednoto 7.

e) Ja konata estas la memstara uzo de „*um-*”, supozeble de Baghy iniciatita en „*Hura!*”, dum ankaŭ „*bo-*” estas tre bone memstare uzata; Wüster en *Enciklopedia Vortaro* mencias la vorton „*boeco*”. — (Red.).

RIMARKIGO PRI LA ĈI-SUBA TABELO

Mi atentigas, ke ĉi tiu tabelo rilatas nur vortojn, ne dependajn vort-elementojn, tiel ke la sumo ne povas ekzakte akordi kun la tutaĵo de la antaŭe priskribitaj lingveroj. Ĝi ankaŭ ne povas akordi kun la cifero donita de Waringhien en *Scienca Revuo* 7 139, nome 2612 (vidu supre piednoton 37) pro tio, ke 1. mi rigardas *Pasko* kaj *Pentekosto* kiel komunajn vortojn, ne proprajn nomojn, sed mi ne enalkulas la kunmetaĵon *Kristnasko*; 2. mi ellasas kelkajn el tiuj afiksoj kiujn Drezon (lok. cit. p. 27) konsideras la solaj vere tiaj, nome tiujn, kiuj aspektas strange kiel sendependaj vortoj: *bo-*, *-ĉj-*, *-nj-*, kaj *-um* (sed ne ankaŭ *ge-* kaj *-ad-*, ĉar, kiel Plena Vortaro montras, ili povas esti memstaraj^{e)}); 3. mi ignoras kelkajn lokajn vortojn (vidu piednoton 37).

Rimarku, ke *dum* estas kalkulita nur unufoje, kvankam ĝi devus aperi kaj inter la subjunkcioj (kiun funkcion ĝi havis en la latina) kaj inter la prepozicioj, al kiu funkcio *Zamenhof* tre lerte etendis ĝin, sekvante en tio *G (während)*.

Kie temas pri malmultaj vortoj, mi aldonas ilin, por ke oni vidu laŭ kiu kriterio mi faris la distribuon.

TABELO DE LA LINGVA DISTRIBUO DE LA ESPERANTA VORT-TREZORO

Latinaj	383	} 861 latin(id)aj
Francaj ¹⁾	401	
LF	38	
Italaj ²⁾	39	
FA	479	} 663 latin(id)-ĝermanaj
FG	33	
FAG	83	
LA	36	
LG ³⁾	7	
LFA	19	
LFG ⁴⁾	1	
LGA ⁵⁾	5	
FR ⁶⁾	3	} 31 latin(id)-slavaj
FP ⁷⁾	9	
FRP ⁸⁾	8	
LR ⁹⁾	2	
LP ¹⁰⁾	7	
LRP ¹¹⁾	1	
LFP ¹²⁾	1	

FAP	41	} 506 latin(id)-ĝerman-slavaj
FAR	16	
FGP	16	
FGR ¹³⁾	9	
LGP ¹⁴⁾	2	
LGR ¹⁵⁾	1	
FAGP	69	
FAGR	34	
LGRP ¹⁶⁾	1	
LFRP ¹⁷⁾	1	
FARP	27	
FGRP	39	
LAGRP ¹⁸⁾	3	
FAGRP	247	
Germanaj ¹⁹⁾	140	
Anglaj	111	
AG	75	
GR ²⁰⁾	16	} 117 ĝerman-slavaj
AR ²¹⁾	2	
GP ²²⁾	17	
AP ²³⁾	10	
AGR ²⁴⁾	9	
AGP ²⁵⁾	11	
GRP ²⁶⁾	31	
ARP ²⁷⁾	4	
GARP ²⁸⁾	17	
Rusaj	10	} 29 slavaj
Polaj	7	
RP	12	

Entute: 2533

Aldonu:

Grekaj	6 (kaj, ĥepat, ihtiokol, kolimb, leontod, piroz)
Artefaritaj:	
Korelativoj	45
*Adverboj	5 (parkere, pli, plej, tuj, ajn)
Pronomoj	1 (ĝi)
Afiksoj	7 (eg. er, estr, iĝ, on, op, um)
Substantivoj	1 (edz)

Entute: 2598

*) Naciaj formoj arbitre modifitaj; vidu p. 101, 102.

Do tuj rekoneblaj:

Al latinid-lingvanoj: 2061 = 79,33 %

Al ĝerman-lingvanoj 1612 = 62,05 %

Al slav-lingvanoj: 683 = 26,29 %

1) Kompreneble preskaŭ ĉiuj francaj vortoj en U.V. devenas el la latina kaj povus do esti klasifikitaj kiel LF. Mi preferas tamen rezervi por tiu ĉi sekcio tiujn vortojn, kies franca formo iom diferencas de la latina, ekz. *am, hom, lun, mol, plumb, surd, temp.*

2) Apog, baston, di, dolĉ, dors (ankaŭ L), erp, feĉ, teliĉ, forn, ĝib (ankaŭ L), guf, kambi, kov, lag, maleol (ankaŭ L), martel, mez, morbil, pag, paroĥ, pec, potenc, prov, punt, sabat, silvi, sinjor, skatol, skerm, spron, sput, sven, tavolo, vant, + 3 adverboj, 1 prepozicio, 1 afikso.

Povas esti, ke la signitaj devenas rekte el la latina. Rimarku ankaŭ, ke la latina povas esti ne-klasika, ekz. *pag* kaj *silvi*. *Sabat* kompreneble povus deveni rekte el la hebrea, sed laŭ rekonebleco ĝi apartenas al ĉi tiu sekcio.

3) Frukt, grad, insul, kalk, libel, nebul, vesp. (LG)

4) Regul. (LFG)

5) Altar, gratul, intermit, ranunkol, subjekt. (LGA)

6) Eŝafod, Pask, pilol. (FR)

7) Alun, didelf, hosti, kloŝ, kokluŝ, kolport, omar, surtut, trivial. (FP)

8) Buked, diabl, eskadr, magazeno, ment, nov, tribun, vual. (FRP)

9) Kapitel, polus. (LR)

10) Febr, gust, konval, kukol, liter, migdal, pav. (LP)

11) Dom. (LRP)

12) Ros. (LFP)

13) Ĉarnir, dres, etaĝ, falbal, fazan, fe, Februar, kontor, spion. (FGR)

14) Marmor, punkt. (LGP)

15) Timian. (LGR)

16) Kaŝtan. (LGRP)

17) Vi. (LFRP)

18) Lili, mus, vidv. (LAGRP)

19) Inkluzive de *brog* el *brühen* (vidu *Esperanto* 1951/90 kaj 286).

20) Graf, kamen, kamer, kegl, kokos, konus, lak, levkoj, lod, monaĥ, nu, oblat, orden, perlamot, persik, ŝtup. (GR)

21) Anĝel, fut. (AR)

22) Asekur, bud, daktil, fundament, kelner, kret, lut, majstr, papag, rab (kp. *Esperanto* 1951/286), rabat, rigl, ŝat, ŝnur, tapet, tornistr, varb. (GP)

23) Asparag, ĉap, cinam, dediĉ, fortepian, kurten, ostr, pat, pipr, pumik. (AP)

24) Abat, April, Aŭgust, brov, fokus, Januar, kastr, rif, ŝtat. (AGR)

25) Artiŝok, fald, mast, matrac, ofer, ole, pekl, pips, privat, strik, sublimat. (AGP)

26) Cirkel, delfen, funt, galanteri, gramatik, granat, grifel, groŝ, kahel, kantor, kapel, kas, klap, klav, konkur, kovert, marcipan, par, pasteĉ, pastinak, pergamen, plot, procent, rimen, rot, ruben, ŝak, stab, ŝtal, vafl, vat. (GRP)

27) Arest, orgen, paŝt, sam. (ARP)

28) Diskont, flag, gips, gum, klub, magnet, muf, nul, pak, plastr, plus, porter, premi, rapir, sardel, spinac, ventol. (GARP)

INDEKSO

Applebaum 106	Jespersen 94
Aspekto de verboj 98, 105	Kotzin 105
Baghy 106, 107	Lingwe Uniwersala 96
Bastien, Gen. 106	Luyken 106
Beaufront, de 101	Mayor, Prof. 102
Butler, M. C. 106	Occidental 106
Collinson, Prof. 94, 105, 106	Slavismoj 103, 104
Couturat 95	Stojan 93, 95, 99, 105, 106
Drezen 99, 104, 105, 107	Svahili-lingvo 102
Eneido 102, 106	Universo 105, n. 1, 2
Grabowski 106	Volapük 100, 105
Greka lingvo 105, 106, 108	Volapukismoj 100, 101
Hankel, Marie 93	Wahl, de 106
Hebrea lingvo 105, 106, 109	Wajsblum 105
Hungara lingvo 105	Waringhien 105, 106, 107
Ido 105, 106	Wüster 107
Japana Lingvo 106	Zakrzewski 105
Javal 101	Zamenhof, Lidja 106

FREMDAJ VORTOJ CITITAJ

<i>germanaj</i>	<i>francaj</i>	<i>anglaj</i>
(be-)liefern 105	cousine 103	cuz 103
brühen 109	dont 97, 105	drink 101
dreschen 102	étui 105	forget 102
Frau 103	jusque 105	thrash 102
Fräulein 103	malheureux 102	<i>rusaj</i>
Fron 103	malsain 102	kadilo 105
geschlachtet hätte 106	peser 101	pravilo 105
irgend ein 105	plus 101	<i>polaj</i>
je 101	tout-de-suite 105	gdzie 97
Prinzessin 103	tricoter 102	jedzyna 103
Schlüssel 105	<i>latinaj</i>	wyszyscy 97
trinken 101	dum 107	<i>rus-pola</i>
(ver)achten 102	male sana 102	bez 99
vergessen 102	insana 102	<i>gota</i>
während 107	<i>svahili</i>	frauja 103
zielen 105	fumba 102	
<i>jida</i>		
Rebbedzin 106		

de D. B. GREGOR

408.92 : 415.411.1 : 412

1. KION LA UNIVERSALA VORTARO VERE INSTRUAS
PRI LA GRAMATIKA KARAKTERO DE LA
ESPERANTAJ RADIKOJ

Kiel sciante, unu el la pruvoj uzataj de tiuj, kiuj subtenas la kategoriecon de la Esperantaj radikoj, estas la fakto, ke la signifoj donitaj en U.V. en la kvin naciaj lingvoj klare montras, ĉu temas pri substantivo, verbo, adjektivo, aŭ adverbo¹⁾. Se tio ne sufiĉas - kaj estas²⁾ kiuj asertas, ke la naciaj lingvoj, ne havante „radikojn”, devis aperi en iu difinita formo, kiu do pravas nenion -, ni povas aŭskulti Zamenhof mem, kiu, uzante frazojn³⁾, kia „mi intencis doni al la radiko signifon verban” ŝajnas ne plu lasi dubon, ke almenaŭ laŭ intenco li dotis ĉiun Esperantan radikon je iu gramatika karaktero. Ĉi tiu dotado tamen ne okazis laŭ ia ajn antaŭfiksita plano. Vane ni serĉus en U.V. ian kriterion, kiu gvidis la distribuon de la kategorioj. La malfeliĉa paro *broso/kombilo* - fonto de tiom da larmoj - sufiĉas per si por montri, ke la elekto de la kategorio okazis tute hazarde. Kiel de *Saussure* atentigis en eble ne sufiĉe rimarkita⁴⁾ frazo, la gramatika karaktero de ĉiu radiko „rezultas nur de arbitra decido de Zamenhof mem”.

Oni riproĉas al Esperanto multajn arbitre elpensitajn erojn; sed la plej arbitra el ĉiuj, ĝuste pro tio, ke ĝi eĉ ne estas „elpensita”, estas la disdivido de la radikoj inter la gramatikaj kategorioj.

Ĉi tiu iom malagrabra fakto ŝuldiĝas parte al tio, ke la Esperanta leksikono estas kreita nek en unu sola fojo, nek de unu sola homo. Pli ol unu cerbo naskis la U.V. Multaj el ĝiaj vortoj devenas, ne el la kabineta laboro de Zamenhof, sed el la ĝistiam literaturo, kian Zamenhof trovis ĝin en gazetartikoloj kaj libroj verkitaj per diversaj manoj. Neeviteble do, la radiko trovita havis la kategorion kiun necesigis la frazo, kie ĝi la unuan fojon estis uzata⁵⁾. De tio la ŝajna kaprico kiu prezidis la vortfaradon. Ne tiom la arbitro de Zamenhof, kiom la hazardo de la unua uzo, decidis al kiu kategorio apartenos radiko.

Io tamen arbitra restas en la U.V. Se ni atente ekzamenos ĝin, ni trovos, ke iuj radikoj aperas en pli ol unu formo. Post la 13 verbaj radikoj *Flor, gut, honor, kaŭz, kost, not, pik, pren, rul, sem, strek, teg, vest*, estas aldonita la radiko kun la finaĵo -o; kaj ke temas ne pri simpla substantivigo de verbo, sed pri sendependa vorto, estas evidente el tio, ke 5 el la substantivoj havas signifon aŭ neniel aŭ malmulte rilatantan al la verbo: *noto, piko, preno, rulo, tego*. Unu fojon la aldonita substantivo estas kunmetaĵo: *sidi/kunsido*. Unu fojon la aldonita formo